

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONO-HISPANUJO

AVIZO: La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezone la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendas.

NIA DEVIZO : « MARO ESTAS GUTARO »

ENHAVO : Parolado de Dro. L. L. Zamenhof. — Kongresa Raporto. — La Timema Vilaĝanino. — La Najtingalo. — Enlanda Movado. — Oficiala Parto. — Bibliografio.

PAROLADO DE DRO. L. L. ZAMENHOF

ĈE LA MALFERMO DE LA SEPA KONGRESO ESPERANTISTA

KIEL tradicia malfermanto de la kongresoj esperantistaj, mi permesas al mi esprimi en la nomo de ĉiuj kongresanoj nian respektan kaj sinceran dankon al lia reĝa moŝto la reĝo Alberto por la granda honoro, kiun li faris al nia afero, prenante sur sin la protektantecon super nia kongreso. Mi esperas, ke mi esprimos la deziron de ĉiuj kongresanoj, se mi proponos, ke ni sendu telegrafe nian diversgentan saluton al la regnestro de la lando, kies gastoj ni estas, kaj nian dankon al nia alta protektanto. Mi esprimas ankaŭ en la nomo de la kongresanoj nian koran dankon al la urbestro de Antverpeno, kiu afable donis al ni sian helpon kaj moralan apogon. Fine mi esprimas nian koran fratan dankon al tiuj niaj belgaj samideanoj, kiuj tiel laboreme kaj zorge pretigis nian grandan feston.

Mi uzas ankaŭ la okazon de nia festo, por revoki en vian memoron la nomon de unu viro, kiu havas grandegajn meritojn en nia afero. La prelato JOHANN MARTIN SCHLEYER, kies nomon ĉiu el vi konas tre bone, la aŭtoro de Volapük, antaŭ nelonge festis la okdek-

jaran datrevenon de sia naskiĝo, kaj estus nepardoninde, se ni ne uzus la okazon de nia nuna ĝenerala kuneestado por esprimi al li tiujn sentojn, kiujn ni ĉiuj havas por li. Li estas la vera patro de la tuta internacilingva movado. Antaŭ li oni ankaŭ revis pri lingvo internacia, oni provis labori por ĝi; sed tio estis nur teoriaj skizoj, palaj senkorpaj fantomoj en la regiono de revoj. Li estis la unua, kiu diris al si: por lingvo internacia mi volas ne revi, sed *labori*; dum ĉio ĉirkaŭe dormis, li estis la unua, kiu praktike kreis la internacilingvan *movadon*. Volapük ne estis venkita de Esperanto, kiel multaj personoj pensas tute erare; ĝi pereis *per si mem* en tiu tempo, kiam la trankvile kaj senartifike laboranta Esperanto estis ankoraŭ tro malforta, por iun venki; ĝi pereis ne pro sia stranga sonado aŭ pro aliaj similaj kaŭzoj, ĉar al ĉio oni povas alkitimiĝi, kaj kio hieraŭ ŝajnis sovaĝa, tio morgaŭ aperas kiel io tute natura kaj bela; per longa kaj multespeca uzado eĉ la plej sovaĝa idiomo de la plej barbara gento iom post iom fariĝas riĉa, eleganta kaj oportuna lingvo.

Volapük pereis ĉefe pro *unu* grava eraro, kiun ĝi bedaŭrinde enhavis: *absoluta manko de natura evoluiĝovo*; kun ĉiu nova vorto aŭ formo la lingvo devis konstante dependi de la decidoj de unu persono aŭ de facile inter si malpaconta personaro. Kiel sur bastono plantita en teron, novaj branĉoj kaj folioj ne povis nature kreski sur ĝi, sed devis esti konstante skulptataj kaj algluataj. Se ne ekzistus *tiu* eraro, kiun korekti oni bedaŭrinde ne povis, Volapük neniam pereus kaj ni ĉiuj nun verŝajne parolus volapüke. Sed tiu bedaŭrinda eraro, kiun kaŭzis ne manko de talento kaj de laboremece, sed nur tro rapida publikigo de la lingvo, sen sufiĉe matura elprovado, — tiu eraro, kiu pereigis Volapükon, neniel malgrandigas la meritojn de ĝia aŭtoro, kiu la unua potence skuis la mondon por nia ideo; la grandaj meritoj de Schleyer en la internacilingva historio neniam malaperos.

Mi proponas al vi, ke okaze de la festo de Schleyer ni telegrafe sendu al li en la nomo de la tuta esperantistaro nian koran gratulon, nian dankon por lia granda laboro kaj nian deziron, ke li vivu ankoraŭ longe kaj havu la konscion, ke la fruktoj de lia laboro neniam pereos.

Karaj amikoj! Mi staras hodiaŭ antaŭ vi ne esperinte. Ĉar dum la lasta tempo la stato de mia sano estis tro malbona, mi decidis ne veturi al la kongreso en ĉi tiu jaro. Tamen en la lasta momento mi devis ŝanĝi mian decidon, ĉar mi rimarkis, ke la projekto, kiun mi prezentis por diskutado dum la sepa kongreso, ne de ĉiuj estas ĝuste komprenita kaj eble bezonos klarigojn de mia flanko. Tial ne miru,

ke mi ne prepariĝis paroli antaŭ vi pri ia speciala temo, sed mi tuŝos nur per nemultaj vortoj tiun demandon, kies pridiskutadon dum la kongreso mi proponis al vi. Mi ne antaŭvenos vian decidon por aŭ kontraŭ la diskutota projekto, mi volas nur diri kelkajn ĝeneralajn vortojn, por instigi vin bone kaj senpartie prepariĝi por la venontaj diskutoj.

Ekzistas en nia afero demandoj, kiuj povas esti solvataj ne de iu aparta persono, ne de iu aparta nacia asocio, ne de iu aparta institucio, sed nur de la tuta esperantistaro; ekzemple la demandoj pri nia Lingva Komitato, Konstanta Kongresa Komitato, k. t. p. Se iu volas fari simple konsilajn proponojn pri la interna agado de tiuj institucioj, li povas prezenti siajn proponojn al la estroj de la diritaj institucioj; sed se oni faras plendojn, se oni postulas reorganizon, anstataŭigon aŭ eĉ forigon de tiuj institucioj, — tiam al kiu oni devas sin turni? Aŭ se aperas iaj demandoj, kiuj koncernas la tutan esperantistaron, sed apartenas nek al la Lingva Komitato, nek al la Komitato de la Kongresoj, — tiam kiu havas la rajton ilin solvi? En sia privata esperantista vivo ĉiu persono aŭ grupo aŭ asocio estas kompreneble tute liberaj kaj povas agi, kiel ili volas kaj povoscias; sed pri ĉiuj demandoj, duboj aŭ entreprenoj, kiuj koncernas la tutan esperantan aferon, estas nepre necese, ke ni havu la eblon ĉiam scii la veran opinion aŭ deziron de la tuta esperantistaro. Esperanto ne estas ankoraŭ en tia feliĉa stato, ke ĉiu povu nur tiri el ĝi profiton, ne zorgante pri la bonstato de la afero mem: ni devas kaj dum longa tempo ankoraŭ devos propagandi ĝin, kreskigi ĝin, defendi ĝin kontraŭ malamikoj; sed se ni ne havas la eblon regule interkonsiliĝadi, aŭ se niaj interkonsiliĝoj, farataj ne en orda parolmentamano, ne havos moralan valoron por la esperantistoj, ni similos organismon sen kapo kaj sen manoj, ni nenion povos entrepreni, ni staros senmove kaj malpacos inter ni mem.

Mi ne volas en la nuna momento defendi la projekton, pri kiu vi en la plej proksimaj tagoj diskutos; t.e. povas esti, ke la projekto havas gravajn erarojn, kiujn via pridiskutado forigos; tre povas esti, ke la tuta projekto montriĝos neakceptinda, kaj tiam — vi scias tion tre bone — mi ne penos altrudi ĝin al vi kiel mi neniam ion al vi altrudis. Nur pri unu afero mi kore vin petas: kion ajn vi decidus, — ni ne fermu nian kongreson antaŭ ol ni en tia aŭ alia formo faros ian aranĝon, kiu donos al ni la eblon almenaŭ unu fojon en jaro solvi ĉiujn kolektiĝintajn disputojn aŭ dubojn en lojala interkonsento kaj konforme al la vera deziro de la tuta esperantistaro.

La aranĝo de regula kaj rajtigita kongresa voĉdonado, kiun mi

proponis al vi, aŭ ia alia simila aranĝo, kiu eble rezultos el via diskutado, ne estos ia nova institucio kaj per si mem ne ŝanĝos la iradon de nia afero; sed ĝi donos al ni la forton de ordo kaj de solidareco. La institucioj, kiujn ni kreis, aŭ eble ankoraŭ kreos, ĉesos havi la karakteron de ia privataĵo, kiun neniu subtenas kaj multaj atakas. Ili havos rajton diri al la esperantistaro: se ni estas bonaj, respektu nin kaj subtenu nin; se ni estas malbonaj, reorganizu nin aŭ forigu nin. Ĉiu esperantisto scios, al kiu plej alta instanco li devas sin turni, se tio aŭ alia en la komun-esperantistaj aferoj ne plaĉas al li, kaj oni ĉesos konstante sin turnadi al mi, kiu hodiaŭ vivas kaj morgaŭ povas ne vivi, kaj kiu cetere havas nek rajton nek deziron solvi ĉiujn disputojn propradecide.

Ni komencu nian feston kaj ankaŭ niajn laborojn, al kiuj ni dediĉu nian plenan atenton kaj senpartiecon. Se el niaj laboroj rezultos la enkonduko de preciza ordo en nian aferon, tiam la kongreso Antverpena estos unu el la plej gravaj inter niaj kongresoj. Tion ni esperu. Ĉiu el ni havu la firman decidon helpi per ĉiuj fortoj al la enkonduko de ordo kaj forigo de ĉiu malpaco en nia afero. Kun tiu firma kaj solena decido en la koro ni krii: vivu, kresku kaj floru nia afero!



KONGRESA RAPORTO

AKCEPTO EN LA URBESTRAREJO

La 19^{an} Junio, kelkajn minutojn antaŭ la tria, kunvenis en kaj antaŭ la Hotelo Terminus — kie loĝas nia majstro — granda popolamaso: Dro. Zamenhof, la anoj de la Organizaj Komitatoj, la Akademianoj kaj la registaraj delegitoj estis ja veturontaj al la Urbestrarejo, kie ilin akceptos lia urbestra Moŝto, Sro. Jan De Vos. Entuziasmaj aplaudoj ĉie salutis la elpensinton de Esperanto kaj lian sekvantaron.

Sro. Van der Biest-Andelhof prezentis la Majstron al la urbestro kaj la skabenoj; Sro. De Vos kore bonvendiris Dron. Zamenhof, kiu dankis en sia nomo de l'tuta esperantistaro. Jam la ŝampanvino ŝaumis en la glaso; la urbestro donacis al sia eminenta invitito la pokalon, en kiu li (la urbestro) estis trinkinta, kaj prezentis al Sino. Zamenhof la simbolajn antverpenajn rozojn.

La akcepto en la Urbestrarejo estis korega; la ĉeestintoj ĉiam kun plezuro memoros ĝin.

MALFERMA KUNSIDO

La solena malfermo de la Kongreso, okazis en la belega salono de la Zoologia Ĝardeno. Pli ol 2,000 ĉeestantoj prepariĝas por aŭdi la ĉiujaran parolon de nia majstro kiun ni enpresigas aliloke. La parolado de Dro. Zamenhof okazigas kiel kutime bruegan aplaŭdadon.

La urbestro de Antverpeno, Sro. De Vos, legas en flandra lingvo, bonvenan saluton de la urbo al Kongreso : tiu parolado tradukita poste en esperanto estas tre aplaŭdita.

Sro. De Vos, urbestro, parolas frandralingve kaj deklaras sin feliĉa, ĉar li havas ia okazon ne nur doni la moralan subtenon de sia ofico al la kongreso sed ankaŭ alporti la esprimon de sia admiro al la tuta esperantista movado.

La oratoro konstatas la utilon de mondlingvo kaj diras ke ĉe ĉiu, kiu amas sian propran lingvon, la unua sento, ĉe la naskiĝo kaj la propagando de internacia lingvo, estas sento de timo. Sed tiu timo foriĝis, ĉar nun ni komprenas, ke Esperanto ne estas celo, sed perilo : ĉiu konservas sian lingvon por esprimi siajn ideojn, sed oni uzas la mondlingvon, kiam oni volas sin turni al alilingvanoj. Esperanto estas do perilo por kunfratiĝo inter la popoloj, kaj la parolanto diras, ke li ĝojas, ĉar li povas gratuli tiujn, kiuj laboras por atingi tiun belan idealon.

La parolo de Sro. De Vos, tradukita Esperanten de Sro. Ritschie, estis ege aplaŭdata ; poste Dro. Zamenhof stariĝis ; lin salutis akklamado tia, kian certe malofte iu ajn aŭdis ; ĝi ne estis plu nura entuziasmo : ĝi estis fajro kaj flamo.

Sekvas la paroladoj de la diversaj delegitoj nome : Sro. Sybie, oficiala delegito de la Registaro el Norvegujo ; Sro. Vischy, delegito de la urbestro el Praha ; Goeman, delegito de la Belga Registaro ; Perogordo, delegito de la hispana Registaro.

Sro. Perogordo estis komissita de la Reĝo Alfonso XIII por doni al Dro. Zamenhof la insignon de Komandoro de la ordeno de Isabel la Katólica. Tiu insigno, farita el oro kaj multekostaj ŝtonoj, estas kiel oni memoras kolektiva donaco de la hispanaj esperantistoj. Estis vere emocia momento, kiam la ĝenerala konsulo el Hispanujo en Antverpeno metis la rubandon de la ordeno ĉirkaŭ la kolo de la majstro. La aplaŭdoj fariĝis tondro bruega, kiu dauris kelkajn minutojn...

Ni aŭdas ankoraŭ, Sron. Miranda, delegito de la brasila registaro

Dron. Fraga, delegito de la registaro de la Argentina Republiko; la sekretarion de la ĥina ambasado en Parizo en la nomo de registaro el Hinujo; Sron. Fischer, el la Komerca Ĉambro el Galaltz; sinjoron Vischy, delegito de la Rusa registaro; Sron. Reed. id. de la Usona registaro; Yemens, id. de la Usona Ruĝa Kruco: Lees el la ŝtato Masachussets; Moscheles el la Internacia Asocio de la Paco.

Ni aŭdas ankoraŭ salutojn de Sroj. Nufos, Rollet de l'Isle, Delvaux, Josefon, Weber, de la prezidanto de la Kataluna Esperantista Federacio Sro. Bremón, kaj de multaj aliaj. La poliestro el Antverpeno, Sro. Hermand, certigas en bela esperanta parolado, ke li ne estos kontenta ĝis kiam la tuta policanaro Antverpena scios parolitan lingvon. (Estas konstatinde ke pli ol 30 policianoj tre bone parolis Esperanton).

Post la elekto de la naciaj vicprezidantoj, finiĝas la kunsido je la sonoj de nia glora himno.

KAATJE

Sendube, unu el aferoj kiuj plej bone sukcesis en la 7^a estis la prezentado de *Kaatje*. Intence, mi ne volis legi la verkon antaŭ ĝia prezento, ĉar mi proprasperte volis konstati, ĉu estas eble ĝui ĉiun belaĵon de iu verko, prezentata en esperanta lingvo.

Mi ne havis tempon mendi mian sidlokon, kaj kiam venis la horo de la prezento, mi ne povis havi eĉ la plej malgrandan sidlokon... sur la korto kaj loĝioj: feliĉe, la organizintoj de la 7^a, rezervis la «paradizon» por la malfruemuloj, kaj de tiu «altaĵo» mi ĉeestis la belegan disvolvigon de la flandra dramo.

Mi ne kuraĝas diri kiu el la artistoj plej bone ludis kaj parolis laŭ opinio de la publiko. Ĉiu el ili faris tiel bone sian rolon, ke la ĉarmoj de *Kaatje*, la perfektecon de Jan, la mirinde belparolata esperanto de Pomona, la unuvorte rava ludado de ĉiuj, mirigis ĉiun ĉeestanton.

Nu, la sukceso estis grandega, kaj la samideanoj ofte rememoros tiun belan vesperon; realveninte en la malproksima, amata helmo, ili pensos al la ĉarma, juna Holandanino, kiun la doloro plibeligis, kaj kiu sciis suferi tiel paciencie, tiel inde.

La ĉambrego de l'bela Flandra Operejo havis brilan aspekton. Pli ol ordinara esperantista entuziasmo regis, kaj tio jam sufiĉe diras... Ankaŭ la geinterpretantoj meritis ĉiujn laŭdojn; ilia laboro rajtigis la favoran akcepton faritan de la impresitaj kongresanoj. Post ĉiu akto, oni devis resuprenigi la kurtenon tri aŭ kvarfoje; post la tria akto, Sro. Van der Biest-Andelhof aperis sur la scenejo,

kaj elokvente dankis, en la nomo de la ĉeestantaro, la geaktorojn, Sinojn. H. Bertrijn, M. Verstraete kaj M. Janssens, kaj Srojn. J. Verstraete kaj K. Van Rijn, kaj la reĝisoron Sron. A. Van den Heuvel.

La publiko vokis ankaŭ sur la scenejon Sron. Dron. W. Van der Bies, la lertan tradukinton.

Post la ludado la kurteno leviĝis tri, kvar, dekfoje, kaj la vera tondro el aplaŭdoj de la entuziasmigita publiko, montris kiom la dramo estis ŝatata.

LABORA KUNSIDO

La jaŭdon okazis la labora kunsido de la «Sepa» kiu devis esti kaj certe estis tre grava.

Oni diskutis la proponon de Dro. Zamenhof kies celo estis la kreo de organizaĵo plene kaj fidele reprezentanta la tutan geesperantistaron. Feliĉe, tute malsukcesis la celo de la pioniroj de la U. E. A. Certe U. E. A. ne estas deca plenumi la celon de la propono de la majstro. Kaj tion ĉiu konprenis, kaj krom kelkaj ŝanĝetoj estis preskaŭ unuanime aprokata la propono de Dro. Zamenhof.

Partprenis la diskutadon Sroj. Bourlet, Boirac, Pujulà, Mudie, Mybs, Reed, Privat, Hodler, k. a.

FERMA KUNSIDO

La komenco de ĉi tiu kunsido estis la daŭrigo kaj fino de la labora kunsida. Oni entuziasme elaprobis la proponon de Dro. Zamenhof, kaj oni elektis komisionon kiu plenumos ĝian eston. Estas membroj de tiu komisiono Sroj. Bourlet, Cart, Mybs, Mudie, Pujulà, Hodler, Fiŝer, Perogordo kaj aliaj pioniroj.

Multaj Esperantistoj alparolis la ĉeestantaron pri proponoj, sukcesoj, komunikaĵoj, gratuloj, k. t. p., kaj en granda entuziasmo finiĝis la ferma kunsido interradiaŭante unu la alian per la frazo «ĝis revido en Krakovo dum la Oka».

AMUZAĴOJ

Manko da spaco malebligas al ni raporti pri multaj amuzaĵoj de la Kongreso per kiuj niaj antverpenaj samideanoj regalis nin.

Ni raportus longe pri la Internacia Balo okazinta en la Reĝa Harmonia Societo, dum kiu ani povis admiri la belecon de tiom multe da samideaninoj; pri la koncerto de «Vagabonda Klubo» kaj prezentoj de komedioj en kiuj partoprenis tre ŝatinde nia kara amiko Sro. Urbez; pri la Koncerto de Flandraj Kantoj, festo tre bone suk-

cesinta ; pri la tre agrabla ekskurso sur la rivero Skeldo, k. t. p., sed nia ĵurnalo estas malvasta kaj ni devas limigi nian raporton rilate la ampleksojn de nia revuo.

Resume : la 7^a Kongreso de Esperanto, estas ago per kiu niaj antverpenaj samideanoj pruvis sian entusiasmon, kaj la tuta esperantistaro en Antverpeno kunveninta, la vivecon kaj forton de nia sankta ideo.



LA TIMEMA VILAĜANINO

GALOPU, turdkolora ĉevaleto ; kuru, flugu ĉar kiam la bela vilaĝanino vidos cin alvenantan salutos cin per poŝtuko kaj danka rigardo. Galopu, ĉevaleto ke ni tuje alvenos ; kuru, flugu...

Estas en la vilaĝo kaj en ĝia medio, majesta trankvileco kiu similas je biblia paco. Oni devas kredi ĉion dormantan. Mi dirus ke ia mortiga letargiĝo penetris en la malbelajn kaj malpurajn stratojn kaj en la malgrandajn kaj mallongajn domojn. Mi nomus la vilaĝon, silenta dezerto. Sed la resonado de la ĉevala piedbruetado sur la ŝtonetoj de la strato, anoncis mian eraron : post fenestretoj mi vidis ekmontriĝi kuriozaj, grandaj okuloj de timemaj vilaĝaninoj kiuj revas pri la veno de iu sprita kaj kuraĝa kavaliro, kiu dirus al ili amaĵojn igantaĵ ilin senti kiel amataj fianĉinoj.

Mi vidis ŝin post fenestro kiu estas kradita kaj lianita. Ŝi estas fraŭlino kies animo estas pura kaj blanka, kolombina animo ; ŝi estas kamparauino kiu sarkas la grenpaĵojn kaj kolektas la flavan rikoltrestaĵon. Kaj ŝi pensas je mi.

Ŝi estas tiel pura kiel timema. Ankoraŭ ŝi ne kuraĝis moduli apud miaj oreloj la eternan frazon de la enamituloj, la frazon dolĉan kiel la abelĉelaroj. «Mi amas vin». Sed ŝi diris tion al mi per la okuloj kiuj estas la lingvaĵo de la naivaj animoj. Mi devis diveni ŝian penson.

Kiam mi pasas antaŭ ŝia krado mia ĉevalo fiere turniĝadas por ke ŝi rigardu ĝin. Ni ambaŭ rigardas unu la alian. Kaj ŝi ruĝiĝas. Kaj deklinas la vidon de mi, fiksanta ŝiajn pupilojn sur la florajn lianojn.

Mi alproksimiĝas kaj salutas ŝin :

— Adiaŭ, mia amatino.

— Adiaŭ.

— Ĉu vi min atendis?

— Jes, mi atendis vin.

— Ĉu vi min amas?

— Jes; mi amas vin.

Tio estas nia ĉiama idilio. Dum la tempo kiam mi estas apud ŝi eĉ ne rigardas min. Ĝiprenas lianfloron kaj premas ĝin inter ŝiaj longcilandraj fingroj.

Senatente, mi prenas unu el ŝiaj manoj inter la miajn kaj mi intencas alproksimigi ĝin al miaj deziregaj lipoj. Mi volas ami, mi volas kisi... Mia vilaĝanino retiras subite la manon kaj foriras el la fenestro, kie mirigita mi rigardas ŝin; ŝi foriras kiel timema cervidineto divenanta la alproksimiĝon de la ĉasanto.

Kaj ne plu ŝi apudiĝas la kradon. Kaj mi foriras.

— Ne kuru, turdkolora ĉevaleta, ke ni malproksimiĝas je ŝi, ke ĉiumomente nia interspaco estas pli longa.

Kiam mi estis iom malproksime mi turnis subite la kapon kaj mi vidis la timeman vilaĝaninon kisantan furioze la pintojn de ŝiaj fingroj...

A. TORNÉ



LA NAJTINGALO

(Kataluna popola kanto)

| | | |
|---------------------------|--------------------------|------------------------------|
| Vi fluganta al Franclando | Trilu min al la patrino | Sed ne multe al la patro |
| najtingal' | najtingal' | najtingal' |
| trilu min al la patrino | sed ne multe al la patro | ĉar min al paŝtist' li donis |
| najtingal' | najtingal' | najtingal' |
| de belarbaro | de belarbaro | de belarbaro |
| najtingal' | najtingal' | najtingal' |
| sen halt'. | sen halt'. | sen halt'. |

Kuntradukis, Finoj. Amalia kaj Mercé Gili, kaj Sroj. Fred. Pujulà, J. Bremon Masgrau, Delfi Dalmau kaj Estanislau Pellicer dum la revena vojaĝo de la Kongreso de Tarragona.



ENLANDA MOVADO

BARCELONO ¹

La 26^{an} de Majo oni legis en la sidejo de «Espero Kataluna» la verkon *Kaatje* kiu estis prezentata dum la VII^a Kongreso en Antverpeno.

Parolado. — Sro. Delfi Dalmau parolis la 28^{an} de Majo ĉe la «Ateneo Obreiro Martinense» pri «Esperanto kaj esperantismo». La parolanto estis tre aplaŭdata de la aŭdinta ĉeestantaro.

Vizito. — La grupo «Kulturo» vizitis la 28^{an} de Majo la Industrian Lernejon kaj Socian Muzeon: multaj barcelonaj esperantistoj kuniĝis al la grupoj el «Kulturo» kaj restis tre kontentigitaj pro la akcepto farita al ili.

Novaj Kursoj. — En la sidejo de «Esperanto kaj Patrujo» estas klarigata nova kurso kiu okazos lundojn kaj merkredojn de la 9^a ĝis la 10^a.

La 3^{an} de Junio komenciĝis en la grupo «Supren!» nova kurso kiu daŭros la lundojn, merkredojn kaj vendredojn de la 9^a ĝis la 10^a vespere. Ĝi estas tute senpaga.

La proksiman monaton de Oktobro oni malfermos alian kurson.

La 25^{an} de Majo oni inaŭguraciis la kursojn de Esperanto klarigatajn en la grupo «Novan Vojon». Oni paroladis por Esperanto kaj estis legataj diversaj esperantaj poezioj; ankaŭ oni kantis en nia lingvo. La festo finiĝis en dancado dum kiu oni daneis la esperantan dacon *La Rondon*.

Esperantistaj vendredoj. — Vera sukceso estis la parolado kiun faris al ni la kara rusa samideano Sro. G. Ciklari (Tiflisano) ĉefpropagandisto kaj korespondanto de *La Verda Standardo*.

La aŭdantaro kiu plenigis la tutan salonon de la grupo «Semo» (Ateneo Enciclopédico Popular) tre entuziasme aplaŭdis lin post la difino de la kortuŝanta temo «Regno Dia sur la tero».

La parolanto prezentis dokumenton de *La Verda Estandardo* (Hungarujo) per kiu li estas petata propagandi Tutmondan Laboristan Ligon; li esprimis la bonaĵon kiujn alportos al la tutmonda laboristaro la efektiviĝo de tiu bela ideo.

Por propagandi tiun Ligon en nia lando oni bezonas nomi delegiton, kaj Sro. Ciklari petis ke unu el la ĉeestantoj prenu sur sin tiun taskon: volonte ĝin akceptis nia amiko Sro. Francisco Piñol profesoro de la grupo «Libero».

Nia tiflisa amiko foriris al Rusujo. Ni deziras al amiko bonan vojaĝon.

La prezidanto de «K. E. F.», Dro. J. Bremón, faris la 2^{an} de Julio en la grupo «Semo» paroladon pri nia Dua kiu okazis en Tarragona.

1) Parton de tiu ĉi raporto li ne povis publikigi en la lastaj numeroj pro manko da spaco.

Li antaŭdiris ke nia Kongreso estos sukceso kaj la faktoj pruvigis la verecon de liaj vortoj.

Li finis dirante ke la ĉeestantoj al tiu Kongreso konservos plaĉan memoron de la supre dirita urbo.

Poste oni projekciis kelkajn vidaĵojn de Tarragona per kiuj ni nin povis fari pli kapablaj scii kiom estas interesinda Tarragono.

La prezidanto de «K. E. F.» estis treege gratulata post la fino de sia parolado.

Propagandaj ekskursoj. — Organizita de la agema grupo «Barcelona Stelo» okazis la 28^{an} de Majo ekskurso al la najbara urbo Badalona.

Pli ol 300 geesperantistoj foriris de Barcelono en tri tramveturiloj ornamitaj per esperantaj flagoj. Alveninte al Badalona ili estis akceptataj de la urbaj aŭtoritatoj kaj poste ili vizitis la fabrikejon de Sroj. Bosch germanis kie estis ĝentile regalitaj per donaco de la bongusta likvoro tie ellaborita «Anís del Mono».

La ekskursanoj sin direktis poste al la «Círculo Apolo» kie okazis grava propaganda ago. Antaŭ multe da ĉeestantoj Sroj. J. Campdelacreu kaj J. Grau parolis plej konvinke por Esperanto. Fino. Rey ludis fortepiane *La Rondon* kiu estis dancata de multaj paroj de samideanoj : la ekskurso estis granda sukceso.

Resume : bela kaj fruktodona propagando kiun oni devus ofte ripeti.

La 5^{an} de Junio la societo «Esperanto kaj Patrujo» okazigis ekskurson al Moncada. La tieaj esperantistoj hore akceptis kaj akompanis ilin viziti la akvajn putojn. Poste ili sin direktis al «Casino Colón» kie propagande parolis Sroj. Anglada, Bermúdez, Rodríguez kaj Albiñana kiu estis tre aplaŭdataj.

En la grupo «Ĉiam Antaŭen» estas fondita *Ekskursa Fakto* kiu celas alporti per ekskursoj en urbetojn kaj vilaĝojn de Katalunujo, la novan pacan semon, al vilaĝanoj, al kiuj, malgraŭ la konstanta propagando, ne alvenis ankoraŭ la helpa internacia lingvo.

Ĝi celas do, profitante tiujn foriradojn, alporti ĉien, la novan senton. Pro tio, ĝi intencas viziti la tieajn plej lertajn personojn kaj ĝeinstruistojn. Precipe ĉi tiujn lastajn, oni informos pri Esperanto, kaj pri la plej bona metodo por ĝin lerni.

Certe, grava estas tiu entrepreno, sed ankaŭ tre interesa por la progreso de nia afero. Tial, do, oni esperas ke ne mankos kuraĝuloj, kiuj bonvole akompanos la ekskursanojn de «Ĉiam Antaŭen».

De nun, do, restas invitataj partopreni ĉiujn amuzajn vizitojn kaj ekskursojn organizotajn de tiu Ekskursa Fakto, ĉiuj gesamideanoj.

Parolado. — Sro. J. Grau de la grupo «Barcelona Stelo» faris paroladon en la «Casino Apolo» de Badalona la 30^{an} de Julio. La parolado estis sukceso por nia amiko ĉar la ĉeestantaro estis multenombra kaj juste aplaŭdis lin post la fino de lia konvinka parolado.

Lunĉo. — Por solenigi la XXIV^{an} datrevenon de la apero de la unua lerno-libro de Esperanto la grupo «La Rondo» organizis lunĉon kiu okazis en la salonoj de la «Mundial Palace» la 22^{an} de Julio. Ĉerkaŭ 100 gesamideanoj ĉeestis tiun feston kio provas la sukceson kiun ĝi atingis.

Je la fino tostis Sroj. Sabadell, Campdelacreu, prezidanto de la organizinta grupo, Gräu, Dalmau, Baucells, Bravo, Bermúdez, Batet, Gilabert, Gili, Moya, Inglada, Piñol, Renom kaj Dro. J. Bremón, prezidanto de K. E. F., kiu prezidis la feston. Ĉiuj ricevis longajn kaj varmajn aplaŭdojn.

Oni sendis salutan telegramon al la Majstro kaj la festo finiĝis post kanta-do de *La Espero* kaj dancado de *La Rondo*, esperanta danco.

Niajn gratulojn al la grupo «La Rondo» pro ĝia entrepreno.

Novaj komitatoj. — La Direkta Komitato de la grupo «La Rondo» estas de nun la jena : Prezidanto, J. Campdelacreu; Vicprezidanto, P. Molgosa; Sekretario, E. Igual; Vicsekretario, A. Aguiló; Kasisto, P. Aguiló; Financisto, J. Estrems; Bibliotekisto J. Cervera; Voĉdonantoj, A. Fajula, R. Pujol, E. Llobell, F. Montserrat.

En ĝenerala kunveno de la societo «Esperanto kaj Patrujo» oni elektis la jenan komitaton : Prezidanto, J. Mateu (reelektita); Vicprezidanto, J. B. Albiñana; Sekretario, J. Blanch (reelektita); Vicsekretario, E. Valls; Kasisto, M. Rodríguez; Kontisto, J. Garrigosa; Bibliotekistino, E. Fontanillas; Voĉdonantoj, J. Romagosa kaj M. Bermudez.

Ekskursoj. — Por iom ĝiu la freŝan aeron dum tiuj varmaj tagoj «Esperanto kaj Patrujo» organizis dum la monato Aŭgusto diversajn vesperojn ekskursojn al la najbaraj maroj. Multaj samideanoj partoprenis en tiuj ekskursoj inter kiuj oni vidis belajn kaj ĝentilajn esperantistinojn.

Al Antverpeno. — La 17^{an} de Aŭgusto foriris de Barcelono la karavano kiu organizis la societo «Espero Kataluna». Ni vidis en la stacidomo la karavananojn Sroj. J. Bremón, prezidanto de «K. E. F.», Llevat kaj filino, Serrat, Urbez, Dro. Bartomeu kiu estis la kondukanto; Sro. Coll, el Manlleu; Dro. Pallejà kaj edzino, el Ulldemolins; en Culera kunigis al ili Sro. D. Dalmau, kaj en Girona, Sroj. Domenech kaj Colomer.

Pon ĝin adiaŭi, ĉeestis je la foriro de Barcelono inter aliaj samideanoj, la prezidanto de de «Ĉiam Antaŭen»; Sro. Aubeyzon, prezidanto de «Supren!»; Sroj. Anglada kaj Renom el la direkta komitato de «Espero Kataluna», la sekretario de «K. E. F.», k. t. p.

AVIZO : *La barcelona delegito petas al ĉiu grupo kaj societo organizinta iun ajn feston, bonvolu sendi raporton pri ĝi al sia adreso Diputació, 327, 3.^{er}, 1.^a, kontraŭe oni ne povas certigi pri la presigo en K. E.*

TARRAGONA

La 18^{an} de Junio Sro. Delfi Dalmau parolis en la «Gimnasio de Tarragona» pri Esperanto-lingvo kaj Esperanto-sento.

Ĉiuj lokaj ĵurnaloj parolis siatempe pri tiu parolado kaj per ili oni povas konstati ke ĝi estis granda sukceso por la parolinto.

L'ESCALA

La grupo «Norda Stelo» organizis paroladon kiu okazis la 13^{an} de Aŭgusto en la salono «Novedades» por la disvastigado de Esperanto.

La parolinto Sro. Delfi Dalmu estis akceptata en la stacidomo de la profesoro Sro. Ximinis Guri, prezidanto de la grupo kaj ceteraj komitatanoj.

La parolado rilatis «La koro kaj la cerbo kaj Esperanto» kaj bruega aplaŭdado sin aŭdigis kiam Sro. Dalmu ĉesis paroli. Li estis tre gratulata.

Vespere okazis amika kunsido en la sidejo de «Norda Stelo» dum kiu Sro. Dalmu parolis pri didaktiko por la lingvoj; ankaŭ oni parolis pri la propagando de Esperanto kaj pri aliaj aferoj karaj al la esperantistoj.

Ni gratulas la tieajn esperantistojn por la bona aranĝo de la festo kaj al la vilaĝanoj ĉar ili kunvenis grandamase por aŭdi kulturen paroladon.

REUS

La ĉi tiea grupo «Nova Semo» tago post tago havas pli da fervoruloj ol da malamikoj. Antaŭ nelonge Sro. Aguadé, estrarano de ĝi, proponis al la tuta estraro konstati en la kunvena akto, la ĉagreno korsentita de ĉiuj pro la morto de nia inda kunbatalanto kaj direktoro de K. E. Sro. Dominiko Serdà; unuanime estis aprobita.

Je la 1^{an} Aŭgusto «Nova Semo» nomis propagandan komisionon. aranĝonta propagandajn aktojn en la ĉirkaŭaj vilaĝoj. Tiu komisiono aranĝis sian unuan ekskurson dum la dimanĉo 6^{an} de Aŭgusto al Cornudella, kie estis akceptitaj de la tuta Vilaĝestraro. Post vespermanĝi okazis ĉe la kunvena salono de la tiea Vilaĝdomo, nia proponita propaganda akto.

Sro. Enric Aguadé legis dum duonhoro belan raporton, pri la neceso uzi internacian lingvon kaj montris fine la kapablecon de Esperanto kiu nepre taŭgas al tiu afero. La dua estis Sro. Pallejà kiu per diversaj ekzemploj pruvigis la neceso uzi Esperanton kiel internacia lingvo, kaj efike rekomendis ĝian propagandon. Kaj fine Sro. Rocamora aŭskultigis ĉarman paroladon rilate al Esperanto kaj naturaj kondiĉoj de ĝi. Sro. Olivé Vilaĝestro fermis la feston dankante al ĉiuj pro sia ĉeestado kaj precipe al la parolintoj pro siaj verkoj.

En la «Ateneu» oni regalis nin per kinematografia kunsido, kiu vere de ni estis aplaŭdita.

Tiu propaganda komisiono aranĝas nun ekskurson al Mora d'Ebre.

SABADELL

La grupo «Semo» de la grava societo «A. E. P.», el Barcelono, kune kun kelkaj samideanoj el «Esperanto kaj Patrujo» kaj «Esperanta Fako», el «C. A. de D. del C. y la L.», venis tien por viziti la tombon en kiu ripozas nia kara Dominiko Serdà.

Je la tria posttagmeze akompanitaj de amikoj el «Aplech Esperanta Grupo», «Esperanta Semo», «Katolika Stelo» ili iris al la tombejo, kaj la Barcelo-

naj amikoj kiel rememoro al nia direktoro metis sur la tombo rubandon kun la kvar Katalunaj Strekoj en kiu per verdliteroj oni legis «Al Dominiko Serda siaj admirantoj».

Sroj. Piferrer, Martí kaj Miralles, dankis je la nomo de la sabadell'aj esperantistoj la simpatian fakton de niaj Barcelonaj samideanoj.

Poste ĉiuj kune vizitis la sidejojn de la sabadell'aj esperantaj societoj, en kiuj oni povis konstati la simpatian kiun havis nia plorinda amiko inter la Esperantistaro.

Malgraŭ la varmece de la nuna sezono «Esperanta Semo» malfermis kurson de nia lingvo kiu okazas marde kaj vendrede, estante ĉeestita de kelkaj novaj esperantistoj.

ULLDEMOLINS

Nia kara amiko Dro. Roman Pallejà fondis tie esperantistan societon kun la nomo «Montsanta Stelo» kiu aliĝis tuje al nia Federacio.

La Komitato estas prezidata de Sro. Pallejà kaj la membroj estas Sroj. Isidre Fábregas, Pbre., Domingo Baró, Anton Pere, Joaquim Borrull, Salvador Domenech, Pbre., Alexandre Ossó, Pbre., Sino. Joaquina Juncosa de Pallejà, kaj Fino. Teresa Pere.

Antaŭen ĉiam, karaj amikoj, por la bono de nia afero!

TIVISSA

Nia karega samcelano Sro. Mario Brú, profesoro de privata lernejo en tiu urbeto instruas Esperanton al knaboj.

Estas unu el la plej bonaj rimedoj la instruado de nia lingvo ĉe la lernejoj por atingi nian celon.

Al Sro. Brú niajn gratulojn pro liaj agoj.

MANLLEU

La tiea grupo «Esperanta Amo» organizis gravan vesperkunvenon en kiu partoprenis Finoj. J. R. y M. Caballería, C. Colomer, F. Parredas, M. Vilalta, C. Castells, M. Aufiró kaj Sroj. Coll Calvet, Coll Espadaler, R. Bruch, P. Ramoneda, M. Jaumeandreu, G. Altafaja kaj aliaj, kies nomojn ni ne rememoras.

La festo okazis ĉe la societo «Rafel de Casanova», kies salonoj estis plenaj da ĉeestantoj kaj samideanoj helpante per sia ĉeestado la atingo de bona sukceso.

Dum la festo estis kantataj *La Najtingalo* kaj *La Ŝpinistino*, katalunaj popularaj kantoj, kaj ankaŭ estis legitaj *La Linio* kaj *La Blinda Bovino*.

Je la fino Sro. Coll Calvet parolis pri la utileco de tiaj festoj por alvarbi novajn adeptojn al nia sankta afero, kaj atingi baldaŭe nia triumfo.

Fine, bela kaj memorinda festo, elkiu ni devas zorgi ke la semita semo fruktigu bone.

SANTA COLOMA DE FARNÉS

La ĉi tiea grupo elektis kiel riprezentanton por la Asambleo el Palafrugell Sron. Pere Costa.

Okaze la somerrestado en nia gaja urbeto de kelkaj universitataj studentoj oni malfermis trien kurson klarigata de Sroj. P. Costa kaj Anton Llinàs, en kiu partoprenas 25 ĉeestantoj.

En la jargenerala kunveno estis elektitaj kiel komitatanoj Sroj. Pere Costa, Andreu Ferrer, Josep Puig, Pbre., Josep Canaleta, Joan Mon, Serra, Anton Vila, Tomas Llinàs, Pere Monrrás, Joan Perich kaj Estanislao Aragó.

Unuvoĉe estis elektita kiel Honora Sekretario Sro. Anton Llinàs pro siaj nelacigeblaj laboradoj por la starigado de nia grupo.

SANTA PERPETUA DE MOGUDA

Bela festo okazis la 13^{an} de Aŭgusto organizita de la societo «La Kamparo».

En ĝi partoprenis krom kelkaj geesperantistoj el tiu ĉi urbeto, Sroj. Buxó, el Moncada; Argemí kaj Clerch, el Sabadell; Pastro Coll, el Sant Feliu de Codines, kaj Pastro R. Garriga, el Sardanyola.

Je la fino oni kantis nian himnon *La Espero*.



OFICIALA PARTO

Reunit el Consell Directiu de «K. E. F.» el dia 6 d'Agost en el domicili del president Dr. J. Bremón Masgrau, prengué 'ls següents acords:

Adherir-se al VII Congrès Internacional d'Esperanto que s'ha celebrat a Anvers, del 20 al 27 d'Agost.

Nomenar al Sr. C. Zanni subdelegat a Barcelona amb autorització de cobrar les quotes dels federats d'aquesta ciutat.

Oferir al Sr. Frederic Pujulà, a son regrés de l'extranger, la direcció de la revista KATALUNA ESPERANTISTO.

Nomenar al Sr. J. Palmerola, de Vic, president del Comité organizador local i autoritzar-lo per formar dit Comité i el Comité d'honor.

Publicar i repartir als federats el reglament de «K. E. F.» amb les esmenes que s'hi feren en el Congrès de Tarragona.

Notificar als presidents de les entitats adherides llur nomenament per al Comité Consultiu.

Nomenar el mateix Jurat per al Concurs Literari de 1912 que jutjà els treballs del de 1911, suplint la vacant que deixà la defunció del Sr. Domingo Serdà, el Sr. Josep M.^a Terricabras, de Vic.

Adoptar com a lema de «K. E. F.» *Maro estas gutaro*, de la Sta. Eularia Rossell.

Mavista Komisiono. — En la raporto de la 2^a kunsido de nia II^a Kongreso okazinta en Tarragona, ni forgesis diri ke Sro. Pellicer je la nomo de sinjoro J. Astell, sekretario de la Marista Komisiono, legis raporton pri la ago farita kaj farota de tiu Komisiono; en tiu raporto li esprimis plej varman dankon al Sroj. Rollet de l'Isle kaj Hóveler pro la helpo kiun ili donis al tiu ideo, saman dankon al *La Revuo* pro la donaco de grava nombro da ruĝaj broŝuroj kaj al Sroj. Amades, Bordás, Aubeyzon, Dalmau, Gili kaj Blanch, kiuj tre efike helpis tiun komisionon per ilia agemeco en la soldserĉado.

El retrat de la senyoreta Maria Caballero, reina de la festa del *Literatura Konkurso* celebrat durant el Congrès de Tarragona, que no varem poder publicar en el número passat per aver arribat tard a nostres mans, el publicarem en el proxim número perquè l'excés d'original ens impedeix fer-ho en el present.

BIBLIOGRAFIO

Ni nun raportos pri verkoj duope senditaj al la Redakcio.

La Gildhala Pro-Paca Kunveno en London. Broŝuro 24^a paĝa, redaktoro Sro. Harrison Hill. Prezo : 1 penco.

Tiu ĉi broŝuro enhavas la raporton de la pro-paca kunveno okazinta la 28^{an} de Aprilo 1911^a en Londono.

En ĝi parolis Sroj. Lord Mayor (ĉefurbestro), de Londono; Asquith (ĉefministro), Balfour (eks-ĉefministro), Sir Edward Grey (brita ĉefministro de Alilandaj Aferoj), kaj aliaj eminentuloj : ankaŭ enhavas la Propacajn Parolojn de Sro. Andrew Carnegie, kaj la letero de Lia Reĝa Moŝto Georgo V^a.

La Turisto kun la Verda Stelo. Monologo, por Sro. de O. Van Schoor, eldonita de Centra Esperantista Belga Oficejo. Prezo : 0'16 sm.

Tre amuza kaj simpla teatraĵo prepar por esperantaj festoj, en kiu la aŭtoro tute bone kunligis la spritecon kiu ridigas kaj la propagandon de nia afero.

Noto kaj resuma Katalogo pri la Internacia Muzeo de lingvo Esperanto, organizita de la Esperantista Centra Oficejo. Publikajo n^o 19 de la Centra Oficejo de la Internaciaj Asocioj.

Tiu ĉi broŝuro dividita en tri partojn enhavas; unue la raporton de generalo Sebert al la Monda Kongreso de Internaciaj Asocioj; due, Noto-Katalogon de la Ekspozicio de la lingvo Esperanto en la Internacia Muzeo de Bruxelles; kaj trie; Statistikajn Tabelojn pri la nombro de Esperantistaj Societoj gazetoj kaj libroj.

La Reĝo de la Ora Rivero aŭ La Nigraj Fratoj, de John Ruskin; tradukls Ivy Kellerman, kajero 18^a de la Esperanta Biblioteko Internacia. Prezo : 0'10 sm.

Plezurege ni legis la ĉarman rakonteton de Ruskin tre bone tradukita al nia lingvo, kaj ni kore gratulas la germanan eldonistan firmon, Möller kaj Borel, pro la zorgo elekti la publikigotajn tekstojn, ĉar el ĉi tiu kolekto ni jam ne scias kiu kajero estos pli grava.

Sinjoro Herkules. Unuakta burleskajo de Georg Belly; tradukis H. Aruty kaj M. Rutin. Kajero 19^a el la antaŭe nomita Biblioteko.

Ni preferus vidi la teatraĵojn sur la scenejo ol legi la librojn, ĉar ĉiam estus pli ĝusta la recenzo per la prezentado ol per la simpla legado, sed tio ne signifos ke legante *Sinjoro Herkules* ni ne vidis bonan dialogon, kaj bonan teatraĵon, tute ne, la aŭtoro sin montras lerta kaj bongusta en tiu malfacila arto. La traduko bona.

Himno Espero, melodio por soprano aŭ tenoro; poezio de Dro. L. L. Zamenhof; muziko de Henri de Coopet. Prezo : 1'50 fr. Vendata ĉe Boulevard Pereire, 179, Paris.